


la Espero

1991:1

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN



ELDONA ELDONAS
MUZIKON

ANONCETOJ

Ĉiu linio kostas 10 kr. Malplej alta kosto 50 kronoj. Anoncetoj konsistas el maksimume dek linioj. Mendu ĉe la redaktanto.

Pola 50-jara invalido urĝe bezonas invalidveturilon kun akumulatoroj. Ĉu iu povas donaci uzitan: Przyborski Boguslaw, ul. Sprzymierzenców 16A/1, PL-76-270 Ustka, Pollando.

26-jara zairano bezonas esperantajn presajojn por perfektigi sian lingvokonon: S-ro Tufuene-Mafuila (Zhou-Mack), c/o Zola-Sedimonia, 11, Rue Auguste-Laurent No 11, F-75011 Paris, Francio.

Nova pensiulo ŝatus malmultekoste gastigi esperantistojn: Maria Maziera, PL-91-046 Łódź, Lutomiarske 103/78, Pollando.

KORESPONDI DEZIRAS:

33-jara teknikisto pri turismo, folkloro, fotografado, poŝtmarkoj kaj bildkartoj: Grzegorz Gokrzywnicki, PL-81969 Gdynia 2, P. Box 165, Pollando.

S-ro Kitungano Rehani Rogobert, 49-jara, adreso: S.L.P. 751, Kigoma, Tanzanio. Hobioj: Korespondado, literaturo.

S-ro Kilima Lambert Tambwe, 32-jara. Adreso: S.L.P., 751 Kigoma, Tanzanio. Hobioj: Vojaĝoj, fotografado, piedpilko kaj muziko.

32-jarulo pri filatelo, sporto kaj literaturo: Wojciech Bera, Duchowo 24, PL-54-300 Milicz, Pollando.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Redaktör: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Sättning: Leif Nordenstorm, Per Aarne Fritzon

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1990

Prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08 -11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11 - 13 och 17.30 - 19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1991: Direktansluten medlem 125 kr.

Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 50 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589-155 31 (nordiskt samarbete)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Lilla Tolsered väg 2265, 425 42 Hisings Kärra, tel. 031-57 11 33 (årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91 (kansliet, massmedier)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-122 05 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Bertil Andréasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Styrelseledamot: Haldó Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-17 36 87 (intern.org.)

Suppleant: Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten, tel. 08 - 97 47 76

Suppleant: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september - 15 maj: torsdagar 17 - 18.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson, Storgatan 13 753 31 Uppsala

Enhavo

- 2 Anoncetoj
- 3 Enhavo
- 3 Prezidanto
- 4 Bonvenon al Gotenburgo
- 5 Kombina bileto al Gotenburgo
- 5 Programo por la jarkongreso
- 6 Kongresaj kotizoj kaj prezoj
- 6 Donacoj
- 7 Esperantoförbundets
verksamhetskonferens
- 8 IJK okazos en Karlskoga
- 9 Kotizotabelo de la IJK
- 9 Foliumas vortaron
- 11 Temo: Kiu havas abelojn...
- 11 Krucvortenigmo
- 12 Valdemar Langlet – heroo en la
ombro de Wallenberg
- 13 Recenzoj
- 13 Bergen 1991
- 14 Tra la lando
- 14 Tra la mondo
- 14 SEJU

Prezidanto

Malpaco kaj malkompreno

La nova jaro vere ne komenciĝis bone. La terura minaco en la Persa Golfo pendas super ni. Kaj la terura atako kontraŭ la Baltaj landoj kaj speciale Litovio forte indignas nin. Oni komencis vidi ilian liberecon, tiam la bato falis! Mi esperas, ke ilia situacio solviĝos (mi skribas tion ĉi meze de januaro), kaj ke la svedoj apogos ilin kiel eble plej multe.

La mondo vere bezonas bondezirojn por la nova jaro. Por esperanto mi ankaŭ bondeziras kaj esperas, ke 1991 alportu prosperan agadon, malgraŭ la maltrankvileco preskaŭ ĉie en la mondo. Oni povas konstati, same kiel Zamenhof, ke parte tiu maltrankvileco dependas de lingva malkompreno (kompreneble nuntempe plejparte dependas de mono, potenco kaj ŝanĝiĝo de politikaj ideologioj). Oni ofte aŭdas alt-rangajn personojn en gravaj paroloj kaj diskutoj balbuti la anglan lingvon – aŭ aliajn ol siaj propraj. Tio ofte rezultigas miskomprenojn. Ofte oni havas okazon miri kiel homoj ne komprenas, kiel bona solvo estus havi unu komunan lingvon en siaj internaciaj kontaktoj. Tiam ĉiuj parolus laŭ samaj kondiĉoj!

Sed tiu nekomprenebleco de homoj dependas ne nur de ili, sed ankaŭ de nia ne sufiĉe forta kaj akra informado. Estas nia grava devo plibonigi nian merkaton, celante informi pri esperanto.

Paŝo al tia plibonigo estis nia

agadkonferenco en Stokholmo, en kiu partoprenis ĉ. 30 klubaj reprezentantoj. Ĉefe ni diskutis la venontan esperantan agadon. Multajn proponojn kaj ideojn ni ricevis, kaj kvankam (aŭ ĉar) la opinioj kelkfoje estis kontraŭaj inter si, la rezulto estis vere kontentiga.

Speciale pri informmaterialo la opinioj estis diversaj. Tio ofte dependas de tio, kiamaniere la kluboj aŭ unuopaj esperantistoj informas – ĉu per grandaj aŭ/kaj koloraj diapozitivoj, ĉu kun aŭ sen manuskriptoj... La maniero estas multaj kaj diversaj!

La bezono de diversaj kursoj sub gvido de SEF por informantoj, organizantoj kaj videfilmantoj estis pridiskutata. La kurskotizoj ludas rolon. Ĉu semajnaj aŭ regionaj? Ĉu tutlandaj aŭ regionaj? Jen demandoj pripensindaj!

Kelkaj kluboj sendas programojn en la proksimradio. La rezultoj estas nemezureblaj, sed la elsendoj certe gravas por la informado. La kluboj en Malmö kaj Västerås prezentis specimenojn de siaj programoj, kiuj estas bonkvalitaj. Mi mem havis okazon aŭskulti du programojn en Malmö kristnaske, kiuj vere estis profesiaj.

Gravaj temoj, kiujn ni kompreneble diskutis, estis kiamaniere konvinki lernejojn kaj radion/televizion pri la neceso de esperanto. Eble la federacioj de instruistoj kaj la politikistoj estos pli influeblaj kiam la nova lernoplano estos akceptita!

(daŭrigo sur paĝo 16)

Bonvenon al Gotenburgo kaj aktivaj esperantotagoj

La esperantistoj en Gotenburgo bonvenigas vin al la jarkongreso, kiu okazos je la 3 – 5 de majo en Hotelo Opalen. Jam pasis multaj jaroj post la antaŭa kongreso en Gotenburgo en la fino de la sesdekaj jaroj.

Gotenburgo estis fondita en 1621 de la reĝo Gustav II Adolf. La urbo havas ĉirkaŭ 500 000 loĝantojn. La ĉirkaŭaĵoj de Gotenburgo estis jam dum la vikinga periodo grava loko por la nord- kaj okcident-eŭropa komerco. Kiam Gotenburgo estis fondita estis tial ne nur sveda intereso en tio. Nederlandanoj helpis en konstruado de kanaloj. Skotoj kaj angloj konstruis domojn kaj ankaŭ kontribuis al la komerco kiu kaŭzis ke la urbo fariĝis markomerca urbo de unuavica rango. Kiel turistoj en aŭ esploristoj de Gotenburgo oni ankoraŭ povas vidi multajn konstruaĵojn kaj memoraĵojn en la centro de la malnova tempo, ekzemple la domon de *Ostindiska kompaniet*, en kiu troviĝas la historia, etnologia kaj arkeologia muzeoj, aŭ *Kronhuset*, unu el la plej malnovaj domoj kaj la fortikaĵoj *Lejonet* kaj *Kronan*. Tie oni ankoraŭ povas senti la malnovan tempon. Sed revenante al la moderna tempo oni konstatas ke la dua plej granda urbo de Svedujo estas granda industria urbo kaj almenaŭ antaŭe havis grandajn ŝipkonstruejojn. Dum la lastaj jardekoj la ŝipkonstrua industrio multe malkreskis, parte pro eksterlanda konkurenco. La haveno estas la plej granda en Skandinavio.

Ni faru promenon de *Götaplatsen* al *Nordstan!* Starante ĉe la ŝtuparoj de la arta muzeo, kiu cetere estas tre vidinda, ni vidas antaŭ ni *Kungssportsavenyn*, impona, larĝa strato. Dekstre de ni estas la urba teatro kaj maldekstre la koncertdomo. Ankaŭ dekstre kaj iom for staras la urba biblioteko, kiu ne

nur havas grandan stokon da libroj, sed ankaŭ gazetojn el la tuta mondo kaj ĉambrojn por preleĝoj kaj teatraĵoj kaj kafejon. *Kungssportsavenyn* estas vigla promen- kaj paradstrato por la gotenburganoj. Origine tie loĝis multaj riĉuloj kaj laŭlonge de tiu strato estas multaj hoteloj, restoracioj kaj kafejoj. Plej agrablaj kaj belaj stratoj estas somere, kiam ĝi similas al Pariza avenuo kun siaj trotuarkafejoj, promenantoj kaj stratmuzikantoj. Baldaŭ ni transiras *Nya Allén*, longan trafikdensen straton, ĉirkaŭ kiu estas granda parko. Trapasinte tiun straton, ni vidas dekstre alian parkon – *Trädgårdsföreningen*, en kiu troviĝas domo kun tropikaj plantoj, restoracio kaj somere bela florgardeno. Maldekstre de *Trädgårdsföreningen* estas *Stora Teatern*, kiu estas bela muzikteatro. Ĝi estas tro malgranda por la nuntempa bezono kaj estos espereble baldaŭ anstataŭigita per pli granda teatra konstruaĵo.

Nia promeno daŭras al *Kungssportsplatsen*, ĉe *Vallgraven* – longa rondira kanalo. Ĉi tie fluas la boatoj nomitaj *Paddan*, per kiuj turistoj povas ekskursi sur la kanaloj kaj en

la haveno. Ĉe *Kungssportsplatsen* troviĝas ankaŭ turistinformejo kaj apude granda statuo, kiu estas Karlo la IX-a sur ĉevalo. Daŭrigante nian piediron ni baldaŭ venas al *Gustav Adolfs Torg*. Meze de la placo staras la statuo de la fondinto de la urbo – la reĝo Gustav la II-a Adolf. Ĉirkaŭ la placo staras gravaj konstruaĵoj kiel la urba domo kaj la borso, kie kunvenas la urba registaro. Kelkaj paŝoj for de tiu placo estas *Nordstadstorget* – moderna komerca subtermenta centro. Ĉi tie oni trovas vendejojn, bankojn, restoraciojn k.t.p.

Gotenburgo havas ankaŭ vidindajn ĉirkaŭaĵojn, ekzemple la grandan arkipelagon. Aliaj vidindaĵoj en la urbo estas la botanika ĝardeno, situanta proksime al *Slottskogen* – la plej granda parko; la katedralo, konstruita en 1825; la fiŝa foiro *feskekörkan*, kiu troviĝas en preĝejsimila domo; *Kronhuset* kun *Kronhusbodarna*, kiuj havas diversajn butikojn de manlabora speco. Nepra vizitinda estas la amuzparko *Liseberg*, kiu estas tre plaĉa loko vespere.

Ralf Jalming

SEF kongreso	
	★ 3-5 Majo 1991
GOTENBURGO	
Skicka inte brev utan kongressmärken!	
Beställ genom pg-konto 481 43 95-2, SEF-jarkongreso, c/o Margareta Hörke	
Pris inkl. porto:	
10 st	15 kr
20 st	25 kr
50 st	50 kr

Kombina bileto al Gotenburgo

"Weekend-Express" signifas kombinan bileton por trajno - hotelo - gotenburga karto. Ĝi inkluzivas:

- trajnvojaĝon en unua klaso kun matenmanĝo
- unu aŭ du noktojn en hotelo Opalen (eblas kompreneble elekti inter pluraj hoteloj) kun matenmanĝo
- senkostajn vojaĝojn en tramoj kaj busoj en Gotenburgo
- senkoston eniron al multaj vidindaĵoj en la urbo, i.a. Liseberg

La prezoj varias depende de tio, el kiu urbo oni venas. Ekz. el Stokholmo la prezo en 1990 estis 835 kronoj por unu nokto kaj 425 kr aldone por ankoraŭ unu nokto. (Samaj prezoj validis por Oslo.) Tio estis por plenkreskulo en dulita ĉambro. Aldono por unulita ĉambro 120 kronoj po nokto. Rabatoj por infanoj.

La prezoj por 1991 ankoraŭ ne estis fiksitaj fine de januaro. Sed vi povas demandi en via fervoja stacio aŭ en vojaĝoficejo pri ekveturaj tempoj por tiuj trajnoj, en kiuj validas la *Weekend-Express*-biletoj kaj ankaŭ pri la aktualaj prezoj por via urbo. Mendu lokon frue.

Atentu! Se vi mendis ĉambron en Opalen per *Weekend-Express*, vi devas mem pagi la hotelkoston, kiam vi aĉetas la fervojan bileton! Sed ne forgesu anonci tion al iu en la LKK aŭ sciigi al hotelo Opalen, ke vi apartenas al la grupo de Sveda Esperanto-Federacio, ĉar ni antaŭmendis ĉambrojn.

"Weekend-Express" betyder en kombinerad biljett tåg - hotell - Göteborgskortet. Det inkluderar:

- tågresa i första klass med frukost
- en eller två nätter på Hotell Opalen (det är givetvis möjligt att välja mellan flera hotell) med frukost

Programo

por la jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio en Gotenburgo, Hotelo Opalen, inter la 3-a kaj 5-a de majo 1991

Vendrede la 3-an de majo

- 16.00 La akceptejo ekdeĵoras.
16.15 - 18.45 **Per Edler**, Bengtsfors, montros sian komputilan tradukprogramon. Estos prezentitaj ankaŭ aliaj esperantoprogramoj por komputiloj.
Urba promenada ekskurso en Haga kaj Masthugget kun gvidanto.
(Por tiuj, kiuj ne interesiĝas pri komputiloj.)
19.00 Interkona vespero
I.a. mallonga prezentado de la urbo
Tesupeo kun saĉato. Distraĵoj.
21.30 Vizito en la amuzejo Liseberg.

Sabate la 4-an de majo

- 07.00 - 08.30 Matenmanĝo
08.30 - 10.00 Jarkunveno de la sveda sekcio de ILEI
09.00 - 10.30 Jarkunveno de SEJU
10.15 Kafo aŭ teo
10.30 Jarkunveno de la Eldona Societo
12.00 Solena malfermo de la kongreso
13.00 Lunĉo (la komunumo invitas) -
14.00 Jarkunveno de SEF
16.00 Kafo aŭ teo
16.15 Prelego de **Mark Fettes**, Roterdamo, pri la eŭropa lingvopolitiko kaj pri la situacio de Esperanto en monda skalo, el UEA-perspektivo.
18.00 Jarkunveno de Sveda Esperanto-Instituto (por elektitaj reprezentantoj)
20.00 Supeo kun programo

Dimanĉe la 5-an de majo

- 07.00 - 08.30 Matenmanĝo
08.15 - 09.00 Diservo en "Norska Kyrkan" - KELI aranĝas
09.15 - 10.15 Mark Fettes prelegas pri Unesko kaj la Esperantomovado.
10.30 Kafo aŭ teo.
11.00 - 12.00 Aŭkcio
12.15 Fermo de la kongreso
13.00 Lunĉo
14.15 Ekskurso per "Paddan" sur la kanaloj kaj en la haveno de Gotenburgo.

Ĝis revido!

Kongresaj kotizoj kaj prezoj

Kongresaj prezoj	Prezo	Kodo
Pago ĝis la 20-a de marto	175:-	A
Pago post 20-a de marto	200:-	B
SEJU-membroj ĝis 20-a de marto	75:-	C
SEJU-membroj post 20-a de marto	100:-	D
Kongresa pakajo en dulita ĉambro	1259:-	E
Inkluzivas manĝojn, kafon, loĝadon. (La unua manĝo vendrede vespere)		
Aldono por unulita ĉambro	320:-	F
<i>Apartaj prezoj: manĝo</i>		
Kafo/teo kaj salato 3 majo vespere	35:-	G
Kafo antaŭtagmeza 4 majo	28:-	H
Lunĉo 4 majo	80:-	I
Kafo posttagmeza 4 majo	28:-	J
Supeo 4 majo	260:-	K
Kafo antaŭtagmeza 5 majo	28:-	L
Lunĉo 5 majo	80:-	M
Bonvolu sciigi nin, se vi deziras vegetarajn manĝojn!		
<i>Apartaj prezoj: loĝado</i>		
Dulita ĉambro po nokto kaj persono*	360:-	N
Unulita ĉambro po nokto kaj persono*	545:-	O
Surplanke enĉambre po nokto kaj persono*	25:-	P
(Bohusgatan 7. Kunportu dormsakon)		
Junulargastejoj ekzistas: Nordengården, tel. 031-19 66 31 Kärralund, tel 031-25 27 61		
(Vi devas mem mendi lokon en junulargastejo.)		
* Atentu! Vi povas aĉeti Weekend-Express-bileton. Vidu paĝon 5.		
Ekskurso per boato su la kanaloj kaj en la haveno 5 majo posttagmeze	40:-	Q
<i>Kongresaj glumarkoj</i>		
10 markoj (inkl. sendkostoj)	15:-	R
20 markoj (inkl. sendkostoj)	25:-	S
50 markoj (inkl. sendkostoj)	50:-	T

Pagu al poŝtĝira konto n-ro 481 43 95-2, SEF-jarkongreso. Notu la kodojn por la diversaj eroj, por kiuj vi pagas.

Kasisto de la loka komitato estas: Margareta Hörke, Pl 4944, 423 55 Torslanda.

- gratis resor på spårvagnar och bussar i Göteborg
- gratis inträde till många av stadens sevärdheter, bl. a. Liseberg

Priserna varierar beroende från vilken stad man reser. T. ex. var priset under 1990 från Stockholm 835 kr för en natt och 435 i tillägg för ytterligare en natt. Detta gäller för en vuxen i tvåbäddrum. Tillägg för enkelrum 120 kr per natt. Rabatter för barn.

Priserna för 1991 var inte färdiga i början av januari. Men du kan fråga på järnvägsstationen eller på en resebyrå om avgångstider för de tåg, där *Weekend-Express* biljetter gäller, och också om aktuella priser från din stad. Beställ plats i god tid.

Obs! Om du själv beställt rum på Opalen genom *Weekend-Express* måste du själv betala för hotellet när du löser ut biljetten! Men glöm inte att meddela någon i LKK eller anmäla till Hotell Opalen att ni tillhör Esperantoförbundets grupp, eftersom vi förhandsbeställt rum.

DONACOJ

Karl Rönnerberg, Västerfärnebo 500. Väinö Ölund, Eskilstuna 125. Paul Täuberg, Vikmanshyttan 300. Karl Wiklund, Göteborg 25. C.G. Ingestedt, Vällingby 100. "Nomon Ne-scias" 50. Heredaĵo de Carl-Erik Carlsson, Stora Levene 15 000. Harry Victorin, Arboga 100. Arthur Bööse, Lidingö 50. Anonimulo 2000. Gunnar Birgersson, Malmö 75.

Memore al Tiberio Morariu: Nils Olsson, Höör 100.

Memore al Agda Olsson: Olle Olsson, Lund 200.

Klubo Cent: Brita Lindeberg, Degeberga 100. Ove Kleborgh, Hässleholm 100. Gustav Nygård, Göteborg 100. Gösta Persson, Häl-singborg 100.

SEF dankas pro la donacoj. Pliaj kontribuoj estas bonvenaj al Esperantoförbundet, poŝtĝiro 20 12-3.


Krom mono, EsperantoCentro volonte akceptas rabat-poŝtmarkojn.

Eperantoförbundets verksamhetskonferens

Helgen 17-18 november anordnades en verksamhetskonferens för landets esperantoklubbar i Stockholm. Det är alltid värdefullt att utbyta erfarenheter och försöka hitta bättre sätt att arbeta för esperanto. I den här artikeln kan vi inte för beskriva varje förslag eller åsikt i detalj, utan bara ge ett axplock på ideer och erfarenheter som framkom

I Malmö har esperantoklubben sängt närradio varje vecka i tre år. En grupp på 5-6 personer arbetar med sändningarna. Arbetet ger kontakt även med ett åttiotal andra föreningar som sänder närradio, och kontaktpunkt för att bjuda in till intervjuer. Programmen är på svenska med inslag på esperanto: nyheter, intervjuer med besökande esperantister, en serie "lär dig litet esperanto" musikkommande program. Klubben till sist tack och adress och telefon till föreningen, sändningstider mm.

I Katrineholm har esperantoklubben valt att inte sända egna



Sten Svenonius e! Malmö hava spertojn pri societa radio kaj hava kontaktojn ankaŭ pri informmaterial



Lisbe Andreasson e! Hörby diris, ke la kunlaboro inter la kluboj de la lando distrikto estas bone organizita.

närradioprogram utan försöker i stället att få vara med i andra föreningars närradioprogram.

Informationsmaterial

Det finns planer om att ta fram allmänt reklammaterial, som tröjor, pennor mm med esperantoreklam.

Broschyrer, affischer och annat tryckt material för information och utställningar finns i lager hos Esperantoförbundet. (Se prislista i La Espero 1990:4, s 60) Under konferensen betonade flera deltagare hur viktigt det är att klubbarna verkligen beställer material och delar ut det. Det är inte nödvändigt att klubbarna lägger ned tid och pengar på att trycka egna broschyrer.

Flera deltagare efterlyste en informationskurs för sådana som vill lära sig att bli bättre informatörer för esperanto. En sådan kurs kanske skulle kunna hållas ett veckostuge eller läggas in som en del av konferensen de befintliga sommar

Utbildning

För lärare finns numera "ferie-tjänstgöring" i fem dagar, som borde kunna utnyttjas för en sommarkurs i esperanto vid Karlskoga folkhögskola. Vi måste hjälpas åt för att alla lärare som är intresserade av esperanto skall få reda på det.


Konferensdeltagarna diskuterade också om vilket material som är lämpligt för att användas vid sidan av kursboken. Juna amiko är en lämplig tidskrift.

Information

Det är viktigt att vi når massmedia. Det har blivit lättare att intressera dagstidningarna för esperanto. För att nå teve måste vi följa teknikens utveckling och producera program med mycket hög kvalitet.

Vissa kursdeltagare har haft stor hjälp av stordia vid informationsbesök i skolor och dylikt, bl a stordior gjorda på häftet Lisa kaj Paŭlo.

Ulla Luin & Leif Nordenstorm



IJK, la Internacia Junulara Kongreso, okazos en Karlskoga

Bonvenon al la 47-a IJK en ĉarma sveda urbo; Karlskoga, proksime al la bela sveda naturo.

Kiam?

La 20-an ĝis la 26-a de julio 1991.

Kie?

En la popolaltlernejo de Karlskoga.

Kiel?

Ĉiel (sed sen drogoj kaj alkoholaĵoj, ĉar uzado de tiuj aĵoj estas malpermesita en la ĉirkaŭaĵo de la lernejo.



Kial?

- Por ĝui la belan svedan naturon.
- Por konatiĝi kun novaj geamikoj el la tuta mondo.
- Por diskuti kaj labori pri la temo "Mondaj Movadoj".
- Por viziti la urbon, en kiu vivis la fondinto de la Nobel-premio, Alfred Nobel, kaj por fari ekskurson al lia lasta hejmo.
- Por sportumi en la kongresa gimnastikejo.
- Por disvastigi nian komunan lingvon Esperanto al la popolo de Karlskoga. Inter alie ni aranĝos komunan koncerton en la urba diskoteko.

ALIĜILO AL 47-A IJK

Familia nomo _____ Persona nomo _____

Strato _____ Numero _____

Poŝta kodo _____ Urbo _____

Lando _____ Telefonnumero _____

Naskiĝdato _____ Sekso _____

Se eblas, mi volas loĝi kune kun:

Nomo kaj lando _____

Mi volas manĝi vegetare Jes Ne

Mi volas loĝi en domo kie oni ne rajtas fumi Jes Ne

Mi devas havi oficialan invitilon Jes Ne

Mi venas el netranspagipova lando kaj pagos surloke Jes Ne

Metu cirklon ĉirkaŭ via kategorielekto A B C Ĉ

Mi pagas laŭ la kotiztabelo + SEK

Mi estas individua membro de UEA kaj rajtas rabaton - SEK

Rabato aŭ krompago laŭ aĝo +/- SEK

Mi pagas al la bankokonto (+ 50) + SEK

Mi pagas sume = SEK

Mi legis, komprenis kaj akceptas la kongresajn regulojn: Estas tute malpermesite uzi drogojn kaj alkoholaĵojn en la ejo!!! Ankaŭ oni ne rajtas fumi endome, krom en certaj lokoj.

Urbo kaj dato _____ Subskribo _____

Kotiztabelo

(svedaj kronoj)

Dato	A	B	C	Ĉ
91 02 28	450	800	1400	2300
91 03 31	750	950	1550	2350
91 05 31	900	1100	1700	2500
Surloke	1300	1500	1900	2700

Notu! Ĉiuj aĝoj estas je 1991-01-01. (100 SEK = 30 NGL)

Se vi havas 30 jarojn aŭ pli, kaj aliĝas al kategorio B, C aŭ Ĉ, vi devas krompagi 300 SEK. Se vi havas malpli ol 18 jarojn, vi rajtas rabaton de 200 SEK. Se vi estas individua membro de TEJO, vi rajtas rabaton de 100 SEK. Infanoj malpli ol 4-jaraj rajtas ĉeesti senpage kaj infanoj malpli ol 12-jaraj pagas la duonan kotizon el la supra tabelo.

Kategorio A

Memzorgado en propraj tendoj. Duŝeblecoj en la gimnastikejo. Kunportu dormsakon kaj matracon.

Kategorio B

Loĝado en tendegoj de kope. Kunportu dormsakon kaj matracon. Duŝebleco en lagimnastikejo. Memzorgado.

Kategorio C

Loĝado surplanke en klasĉambroj. Kunportu dormsakon kaj matracon. Duŝeblecojen la gimnastikejo. Matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo.

Kategorio Ĉ

Loĝado en dulita ĉambro kun propra duŝo. Ekzistas 8- aŭ 12-ĉambraj dormkabanjoj. Matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo.

Kondiĉo por la tuta aranĝo estas, ke minimume 50 personoj elektas la kategorion Ĉ.

Kiel aliĝdato validas la dato de la kompleta pago. Por personoj el netranspagipovaj landoj validas la alvendo de la aliĝilo.

Via aliĝo estas transdonebla al alia persono, sed ni alĝustigos la kotizon laŭ la aĝo de la anstataŭanto.

Se vi malaliĝas ĝis plej malfrue unu monaton antaŭ la kongreso, vi ricevos vian pagon minus 100 SEK.

Bonvenon al 47-a IJK kaj Karlskoga

La temo: Mondaj Movadoj

Ĉiu partoprenanto certe interesigas pri iu monda movado krom Esperanto, ekz. sporto, paco, naturo, kulturo, mediprotektado ktp, ktp. La Esperanto-movado povas lerni multon de aliaj movadoj kaj inverse. Tio estas bona bazo por interesaj diskutoj. Kial ili ekestis, kiel ili ŝanĝiĝis kaj kiel sukcesas ilia laboro, nun kaj estonte?

Se vi volas kontribui al la temo (aŭ al la distra programo) skribu al ni! Sendu ankaŭ la aliĝilon al tiu ĉi adreso:

La 47-a IJK, Box 4278, S-102 66 STOCKHOLM, SVEDIO

Pagu al:

Poŝtĝirkonto 451 19 27 - 8

aŭ al:


SE-Banken, Sergels torg 2,

S-106 40 STOCKHOLM

Kontonumero:

175214 - 10 087 43

Foliumas vortaron



Derk Dam foliumas la provtekston de la nova svedesperanta vortaro, kiu aperos en la printempo. Ĝi nun troviĝas ĉe li por enmeto de la plej lastaj korektoj, faritaj de Ebbe Vilborg kaj Roland Lindblom.

Invito antaŭmendi la novan

svedan- esperantan vortaron

Ni komencas nun kalkuli la tagojn ĝis la apero de la nova granda sveda esperanta vortaro – projekto, kiun ni ĉiuj sekvis kun pli kaj pli granda senpacienco.

Estu inter la unuaj, kiuj povos foliumi en ĝi! Mendu kaj pagu jam nun – por la favora antaŭmenda prezo de

320 kr.

Ĉi tiu prezo validas nur ĝis la 30-a de aprilo 1991 por mendoj jam pagitaj ĝis tiu tago.

Pagu al "Esperantoförlaget", poŝtĝiro 578 - 5, klare indikante vian adreson. La libroj estos ekspedataj strikte laŭ la mendo-ordo. Pluraj jam ekstaris en la vico!

Se vi havas rajtigilon je rabato, vi pagu la rabatitan sumon, samtempe sendante la rabatslipon al la kasisto de Eldona, Lennart Lagerkrantz, Pl 4597 Stennäset, 791 91 Falun.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Kiu havas abelojn, havas mielon...

Tiu ĉi zamenhofa proverbo, kiu signifas, ke ofice ebligas profiton, atestas pri la intima rilato inter homo kaj abelo (*bi*). En Svedio serio da poŝtmarkoj kun bildoj de abeloj eldoniĝis en 1990. Tio ĉi donas al ni kialon iom ekzameni abelojn kaj abelbredadon (=abelkulturon, *bi-odling*).

En abelujo (*bisamhälle*, *bikupa*) estas tri abelaj kastoj (*individslag, klasser*): la reĝino (*drottning, vise*) kiu vivas 3–5 jarojn; ĝis 2000 virabeloj (*drönare*) kaj 10 000 – 70 000 laborabeloj (= laboristinoj, *arbetsbin*).

La ununura tasko de la virabeloj estas pariĝi kun la reĝino. Post pariĝo kun 9–10 virabeloj la reĝino dum sia tuta vivo gardas iliajn spermojn (*säd*) kiujn ŝi uzas kiam ŝi eligas ovojn, ĉiujare 175 000. Kel-

kaj ovoj estas metitaj en kov-ĉelojn (*yngelcell*). Tie la pupoj kreskas, ĝis la novaj abeloj eliĝas.

La laborabeloj havas multajn diversajn taskojn. Ili kolektas nektaron (*nektar*) el floroj. El la nektaro ili produktas mielon (*honung*), kiun ili stokas (*lagra*) en la ĉeloj de la abelujo. Unu abelujo povas produkti kelkdek (*tiotal*) kilogramojn da mielo en unu jaro.


La konstanta rubriko Ĉiutaga esperanto ekde 1991 farigas Temo. Ni traktos ne nur ĉiutagaĵojn, sed ĉiaspecajn temojn. La celo de la Temo-artikoloj estas pligrandigi la vortoprovizon de la legantoj per interesa legaĵo.

Abel(bred)isto (*biodlare*) eligas la mielon el la ĉelaroj (*vaxkakor*) per miel-centrifugilo (*honungsslungare*). Al la abeloj oni donas sukeron, kiel vintran manĝaĵon. La mielo certe estas bonvena, sed eĉ pli grava rezulto de la laboro de la abeloj estas la polenado (*pollinering*) de floroj.

La homoj dum miloj da jaroj manĝis la mielon de sovaĝaj abeloj. Kvinmiljara praegipta bildo montras elpreamadon de mielo el ĉelaro. En Svedio la provincaj leĝoj (*landskapslagar*) mencias abelbredadon. En Svedio nun ekzistas 18 000 abelbredistoj, kun 90 000 abelujoj, kiuj produktas 3 milionojn da kilogramoj da mielo.

Leif Nordenstorm

Krucvorto



Vertikale:

- A. Rilata al Edison
- B. Maljesos – Malplezuros
- C. Mamulo en tero – Malluma ĉambro.
- Ĉ. Nom' de virino – Longorela best'

D. Laŭ la kutimo (r)

- E. Eĉ ne iom – Patriarko kun tri filoj
- F. Gruo' – Forta enspir'
- G. Slava regnestro' – Verko de Harry Martinsson

Horizontale:

- 1. Ni nomas nian lingvon
- 2. Maljesas – Malĝusta faro
- 3. Elektran mezurunuon – Valora pro malofteco (radiko)
- 4. Atendis kun fido – Nova testamento
- 5. Estre priskribata
- 6. Trinkaj' – Ŝirmita kontraŭ infekto
- 7. Skriblikvajan – Prefikso por malestimo
- 8. Kanalurban – Ŝategi
- 9. Malkontraŭstaro – Ŝtoneg'
- 10. Altvaloran ludkarton – Pasia amo

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	M	I	K	R	O	F	O	N	O	N
2	A	L	I	V	E	R	A	S		
3	K	R	I	M	E	T	O	J	A	
4	R	E	P	A	G	O	L	I	R	
5	O	V	O	S	O	R	T	O	E	
6	S	A	N		N	A	R	K	O	T
7	O	S		F		S	I	A	N	
8	C		P	A	N		O	P	E	R
9	I	D	O	L		A	P	O	G	E
10	O	E	R	O		M	O	N	O	

Solve de la enigmo en *La Espero* 6/90

Valdemar Langlet – heroo en la ombro de Wallenberg

Antaŭ kelkaj monatoj, kiam senĉesa pluvo malebligis la aŭtunan laboron en la ĝardeno, mi dediĉis kelkajn horojn al malnovaj paperaĵoj, kiuj plenigis mian laborĉambron. La plejmulto estis de negrava kvalito kaj estis metita en kartonskatolon por posta transporto al la komunuma rubejo.

Tamen – inter la multaj paperoj mi trovis ekzemplerojn de malnovaj parlamentaj protokoloj. Komprenobe ili estis ŝparitaj pro speciale interesa enhavo, kaj mi trafolumis ilin por trovi la kialon.

La solvo de la enigmo estis la nomo Valdemar Langlet.

Ne multaj el la hodiaŭaj esperantistoj konas la nomon Langlet, sed en la sveda historio de Esperanto li estas grava persono flanke de Paul Nylén.

Langlet naskiĝis la 17-an de decembro 1872. Li estis kunfondinto de la Esperantoklubo de Uppsala – la dua Esperantoklubo en la mondo – kaj ankaŭ prezidanto de la klubo dum kelkaj jaroj. Kiam SEF estis fondita en la jaro 1906, li fariĝis ankaŭ ĝia prezidanto.

1899 li edziĝis al finna esperantistino. Post ŝia morto li denove edziĝis en la jaro 1925 – ankoraŭfoje kun esperantistino. Lia dua edzino estis Nina, naskita en Moskvo kaj filino al Nikolaj Borovko, unu el la unuaj pioniroj de Esperanto en Ruslando.

Valdemar Langlet estis nur 22-jaraĝa, kiam li faris longan vojaĝon tra la tiama Ruslando kaj la orientaj partoj de Eŭropo. La belecon de Budapeŝto li kaŝis en sian koron kaj li ĉiam sopiris reiri al Hungario kaj ĝia ĉefurbo.

En la jaro 1931 li surĉevale rajdis 1000 kilometrojn tra Hungario (poste li verkis libron pri la vojaĝo) kaj reveninte al Budapeŝto li ekhavis laboron kiel lektoro de la sveda

lingvo en la universitato de Budapeŝto. Samtempe li estis oficisto en la sveda ambasadorejo.

En la jaro 1944, kiam la fino de la milito pli kaj pli danĝerigis la vivon por la hungaroj, li ankoraŭ deĵoris en ambaŭ siaj oficoj. Li vidis la pli kaj pli kruelajn persekutojn de judoj kaj aliaj, kiuj ne plaĉis al la tiama faŝista reĝimo. Kune kun sia edzino Nina li iniciatis helplaboron sub protekto de la sveda Ruĝa Kruco. Per helpo de siaj bonaj kontaktoj en Budapeŝto li luis ordinarnajn apartamentojn, vilaojn, bienojn kaj eĉ grandbienojn, kie li kaj Nina administris infanhejmojn, hejmojn por maljunuloj kaj kie ili kaŝis homojn, kiuj riskis siajn vivojn aŭ pro tio, ke ili estis judoj, aŭ ĉar ili iamaniere estis nekonvenaj al la registaro kaj la ĉie regantaj germanaj SS-anoj.

Dum la lastaj jaroj de la milito, centmiloj da judoj estis transportitaj al morto en la germanaj koncentrejoj. Langlet, same kiel Raoul Wallenberg, aranĝis "protektpasportojn" por savi ilin. Unue li donis protekton al tiuj, kiuj havis iaspecan rilaton al Svedio, sed kiam la situacio estis pli kaj pli malfacila, li agadis tage kaj nokte por helpi al kiom eble plej multaj.

La laboro de Langlet kaj lia edzino ne estis senriska. Ili eĉ ne hezitis sekrete kaŝi kontraŭstarantojn, kiuj estis vaste serĉataj de hungaraj sagokrucanoj kaj germanaj SS-anoj. Ju pli danĝera fariĝis la situacio, des pli ili laboris.

Kiom da miloj da kompatindaj homoj en vivdanĝero ili savis, kiom da infanoj ili savis el la faŭko de malsatmorto, tion mi ne scias, sed multaj dekmiloj ŝuldas al la geedzoj Langlet profundan dankon pro ilia helplaboro.

Ŝajnas al mi, ke Valdemar kaj Nina Langlet meritas lokon flanke de Raoul Wallenberg. Ilia laboro estis same danĝera, same humane-

ca. La sola diferenco ŝajnas esti, ke ili travivis la inferajn tagojn kaj poste povis reveni al Svedio.

Wallenberg malaperis en la misterajn nebulojn de la ĥaosa militfina periodo. Lia sorto vekis internacian intereson pri liaj persono kaj agoj.

En la granda ombro de Wallenberg nevidiĝis la verko de Valdemar kaj Nina Langlet.

Jes, reen al mia malnova parlamenta protokolo. Trafoliumante ĝin, mi trovis proponon al la parlamento, kiun subskribis kelkaj svedaj parlamentanoj. Ili proponis specialan honoran pension al Valdemar Langlet kaj ilia kialo estis, ke li revenis al la hejmlando senhava, ĉar ĉiujn siajn posedaĵojn li oferis en sia hungara helplaboro. Ili ankaŭ menciis lian heroan kaj sinoferecan agadon dum la plej kruela periodo de la novtempa historio de Eŭropo.

Langlet kaj lia edzino apartenis al tiuj unuaj esperantistoj, kiuj vidis nian lingvon ne kiel nuran libertempan ŝatokupon. Esperanto estis por ili nur parto de internacia humaneco kaj interhoma frateco. Ili meritas elstaran pozicion ne nur inter la svedaj esperantistoj.

En la sveda televido la lerta kaj tre juĝokapabla ĵurnalisto Björn Fontander de tempo al tempo prezentas interesajn programojn pri neordinaraj personoj kaj eventoj. Mian malnovan parlamentan protokolon mi sendis al Fontander, kaj petis lin studi la proponon. Eble la propono pri "modesta pensio persona" povas veki lian intereson fari programon pri tiu ĉi tre interesa kaj forgesita svedo, kiu iris flanko ĉe flanko kun Wallenberg, sed sur kiun ne falis la brilstrioj de la tutmondaj lumjetiloj.

Thomander

(El "Kelklinie pri..." n-ro 9/1990, organo de la klubo en Norrköping.)

Recenzoj

Esploro pri akuzativo

Daniel Moirand: *Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo*. 331 p.

La aŭtoro detale studis 43 modernajn verkojn por vidi, kiel oni efektive uzas la finaĵon **-n** en la nuna Esperanto. La rezulto konfirmas la klasikan dividon en tri uzokampojn (rekta komplemento, alcela movo kaj anstataŭigo de prepozicio), sed montras ankaŭ, ke tiu ĉi fascina gramatikilo vigle pluevoluas. La aŭtoro detale analizas ĉiujn variantojn de uzo, neuzo kaj anstataŭigo de la akuzativo, kaj sukcesas plurloke malkovri (almenaŭ por mi) surprizajn informojn. Li ankaŭ zorge statistikas ĉiujn variantojn. Eble liaj konkludoj kaj analizoj ne estas ĉiudetale komplete kontentigaj, sed la verko tamen formas utiligan bazon por pluj esploroj de la esperanta gramatiko. Kvankam la temo estas sufiĉe komplika, la aŭtoro sukcesis esprimi sin sen superflujaj fakecaj terminoj. La libro do estas legebla ankaŭ al nelingvistoj. Ĝi ne estas por lernantoj, sed anstataŭe absolute nepre al ĉiu,

kiu mem instruas la Internacian aŭ verkas instruilojn.

Bertilo Wennergren

Lernolibro, kiu paroligas la lernantojn

Andrzej Pettyn: *Esperanto en dialogoj*. *Panstwowe Wydawnictwo*, Varsovio 1990. 420 p. 120 kronoj.

Jen la lernolibro por grupoj kun aŭ sen kursgvidanto kaj ankaŭ por unuopaj memlernantoj. Ĝi estas konstruita en formo de dialogoj pri ordinaraĵoj, ĉiutagaj aferoj. La ideo estas, ke oni jam de la komenco paroligu la lernantojn. Ĉar la dialogoj jam ekzistas estas facile uzi la libron ankaŭ sen instruisto, en studronda formo.

Ĝi estas tre ampleksa, enhavas 180 dialogojn en 420 paĝoj. Ĉiu leciono/dialogo konsistas el tri partoj – dialogo kun subparto por varii la dialogon kaj grandigi la vortprovizon, gramatiko kaj skribaj ekzercoj.

Krom kelkaj enkondukaj vortoj en pola lingvo ĝi estas tute en esperanto. En la lastaj cent paĝoj estas

kelkaj tipaj frazoj por korespondado kaj vortareto en ses lingvoj, tamen ne en la sveda.

La nomo Andrzej Pettyn garantias, ke la lingvo estas perfekta kaj mi ankaŭ ne trovis preserarojn en ĝi. La preso estas kontentiga, sed la papero iom malbona, almenaŭ la kovrilo devus esti farita en pli fortika materialo por ke la libro eltenu studadon de la riĉa enhavo ĝis la fino. La libro estas mendebla i.a. ĉe Esperanto-Centro en Stokholmo.

Märta Andreasson

Pri "Roseanna"

Citaĵo el letero de Malte Markheden al la redaktanto de *La Espero* pri la recenzo en *LE* 1990:6, p 91 pri lia traduko de la libro:

Bedaŭrinde li [la recenzinto] ne komprenas aŭ toleras parabolojn aŭ simbolajn esprimojn, kiu estas kutimaj en beletriko kaj kiujn Zamenhof mem ofte uzis. ekz.: "Ĉiu havas sian vermon", "li bruligis al si la lipharojn", "mielo gutadas el viaj lipoj" k.t.p. Normalaj homoj ja komprenas la sencon en la esprimoj.

MM

(Daŭrigo sur p. 15)

BERGEN 1991

Anmäl dig till årets UEA-kongress i Bergen 27 juli–3 augusti 1991.

Kongressavgiften i svenska kronor:

	Till 1991-03-31	Från 1991-04-01
1. Direktmedlem i UEA (DM, MJ och MA)	745	895
2. Ej direktmedlem i UEA	895	1045
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1991-01-01) som är direktmedlem i UEA	450	600
4. Medföljande, handikappad eller ungdom som själv inte är direktmedlem i UEA	600	745

Beställ anmälningsblankett hos **Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 HÖRBY**, tel: 0415/50 152. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till **pg 14 74 29 - 5**, Esperantoförbundet, Specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

(Priserna har fått höjas p g a ändrade valutakurser)

Tra la lando

Svedo premiita

En la jugoslava literatura konkurso "Ivo Rotkvič - 90" la gotenburgo Jim Hornö gajnis la unuan premion en la branĉo originala poezio pro "Ĥimero". Ni sincere gratulas.

Granda donaco

Klubo Esperantista de Malmö ricevis valoran donacon de Brita kaj Sven Sjöblom: pli ol 75 librojn el ilia privata biblioteko. La libroj estas zorge elektitaj, alivorte perloj, de la plej konataj kaj lertaj verkistoj. Ĉiuj estas binditaj.

Klubo

ne forgesu sendi jarraporton kaj aligojn de reprezentantoj al la jarkunveno ktp. (Venis letero de Esperanto-Centro.)

Tra la mondo

SAT denove en orienta Eŭropo

La internacia laborista esperantomovado SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) denove komencis agadi en orienta Eŭropo. En la jarkongreso en Linz, Aŭstrio, preskaŭ triono de la partoprenantoj venis el tiuj landoj. SAT jam havas 400 membrojn en orienta Eŭropo. La sekva kongreso de SAT okazos en Bruselo, Belgio, sed por 1992 ĝi estas invitita al Kaunas, Litovio.

Revuo en Mezorianta Afriko

Jam aperis la dua numero de Orienta stelo. Esperantlingva informilo por Mezorianta Afriko. Redaktas Lutombo Yogolelo kaj Ntawu

En jubilea filmo

La komunumo de Västerås preparas filmon pri la jubilea jaro 1990. En ĝi aperos ankaŭ raporto pri Kultura Esperanto-Festivalo 3, kiu okazis en la urbo.

Kelkaj esperantistoj registris la festivalon sur videobendoj, entute dum 15 horoj. Oni preparas diversajn filmojn pri teatro, rokmuziko kaj aliaj aspektoj de KEF.

SEFA ne plu ekzistas

Sveda Esperanta Fervojistista Asocio ne plu ekzistas. Svedoj kiuj volas esti membroj de esperanta fervojista asocio povas nun aliĝi rekte al la internacia IFEF. Kontaktigu kun: Stig H Carlsson, Sköldgatan 3 B, 1 tr, 212 29 Malmö.

Hangi. La revuo estas presata en Motala, Svedio. La dua numero raportas i. a. pri la esperantistoj en Tanzanio, nome 262 movadanoj en 28 lokoj. Aperas ankaŭ interesa artikolo pri la afrika virino en sia socio.

Tri aktualaj projektoj

Agado E3, la filantropia institucio de la esperanto-movado, nun kolektas monon por tri celoj: sendi 134 okulvitrojn al Nikaragvo laŭ aldonitaj receptoj; sendi urĝe necesajn interesojn al malriĉa sud-afrika hospitalo kaj sendi A-vitaminajn al vjetnamaj infanoj, por ke ili ne iom post iom blindiĝu.

Adreso: Agado E3, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando. Nederlanda poŝtbanka konto: 10 20 100.

Muzikaj folioj

Ĉe la sveda Eldona Societo Esperanto aperis muzika kasedo kun originala esperanta muziko de Ĵomart Amzejev el Kazaĥio, Sovetunio, sub la titolo "Folioj de mia memoro".

La kantisto, kiu jam famiĝis en sia propra lando, prezentas sin al la internacia publiko per elekto de propraj kantoj, verkitaj originale en esperanto kaj muzikitaj de li mem. La plaĉajn kantojn de Ĵomart pliriĉigas la voĉa akompano de Nataŝa Gerlaĥ, same el Kazaĥio.

La voĉoj de la du kantistoj kaj la gitaro de Ĵomart agrable agordiĝas en kantoj pri amo kaj sopiroj. La kasedo, kun kolora kovrilo, surhavas ankaŭ la tekstojn de ĉiuj 19 kantoj.

La kasedo, kun preskaŭ 45 minutoj da muziko, estas havebla ĉe Esperanto-Centro, Brunnsgr. 21, 111 38 Stockholm. Ĝi kostas 86 kronojn, kio inkluzivas ankaŭ la sendkostojn.

SEJU

Junulara renkontiĝo en Gotenburgo

Inter la 26-a ĝis 28-a de oktobro okazis renkontiĝo por junuloj en Gotenburgo. Tiun ĉi tre agrablan kaj bone planitan kunvenon okazigis Inga Johansson.

La semajnfino ĉefe estis ebleco por la estraranoj de SEJU interŝanĝi spertojn kaj ideojn pri la venonta agado kun la anoj de la loka kongresa komitato de la Internacia Junulara Kongreso de TEJO, okazonta en Karlskoga 1991. Tiuj tagoj bone plenumis la taskon kreskigi inspiron, malgraŭ malvarmumoj inter la partoprenintoj, kaj oni naskigis plurajn valorajn ideojn por estonta realigo.


Malin Söderback

La Ranetoj dekjaraj – Festu kun ili!

La Esperanto-junulara societo de Stokholmo 10-jariĝas kaj invitas al jubilea vespermanĝo vendrede la 22-an de marto kaj posta renkontiĝo dum la semajnfino en Sköndal, sudokcidenta Stokholmo.

Ni disponos pri granda kaj bone ekipita infana posttagmezejo, kie eblos diversspeca amuziĝo, de ĉambro-hokeo al rok-koncerto. Ni dormos surplanke, en propraj dormosakoj (kunportu ankaŭ matracon aŭ alian subaĵon), kaj dividos la manĝokostojn inter ni (proksimume 150 kronoj/persono).

Ranet-amikoj – aliĝu nun! Telefonu al Lena Månsson/Per Aarne Fritzon **08/97 47 76**.



Renkontiĝo en Roslagen

Fine de aŭgusto okazis SEJU-renkontiĝo en Barnens Ö en la insularo de Roslagen.

Ĉirkaŭ dudek personoj partoprenis la tri tagojn de kunestado kaj studado. Krom la ordinara programeroj kiel promenoj, saŭnado kaj babilado ankaŭ okazis GEO-ludado, aŭkcio de libroj kaj tri studrondoj. La lastaj temis pri la *Sekretaj Sonetoj* (maldeca poezio!), diskuto pri la libro *La litomiŝla tombejo* kaj pri la persekutoj de esperantistoj dum la naziismo.

Niaj eksterlandaj esperanto-gastoj estis unu nederlandano kaj du ĉinoj, kaj krome iom hazarde gastis nin ankaŭ du junuloj el Usono kaj Belgio, kiujn unu el niaj ĉinaj amikoj senindulge draŝis per pluraj naturmetodaj esperantolecionoj...

Kajsa Larsson

Kalendaro

FEBRUARO

23–29 **Esperantokurs under sportlovet**, Värmland, Tel. 0760-864 61 aŭ 0590-127 35/302 08

MARTO

18 marto–24 majo **Progresantkurso**, Karlskoga popola altlernejo

22–24 **Jubilea renkontiĝo de La Ranetoj** (junulara), Stokholmo (Per Aarne Fritzon/Lena Månsson 08/97 76 47)

28 marto–1 aprilo **Junulara Renkontiĝo**, Valencia, Hispanio (Alberto Bermell, Plus Ultra, 23-4, H-46006 Valencia, Hispanio)

29 marto–5 aprilo **Printempa Semajno Internacia**, Jünkerath, Germanio (Wolfgang Loose, Irisweg 12, D-4755 Holzwickede, Germanio)

29 marto–5 aprilo **Paska (junulara) renkontiĝo**, Roden, Drente, Nederlando (Ron Doesborg, Nederlandsplein 41, NL-5628 AE Eindhoven, Nederlando)

APRILIO

20–21 **SLEA-jarkunveno** (laborista), Uppsala (Yngve Nilsson, Karin Boyegatan 6, 1 tr, 754 28 Uppsala)

20–21 **Esperanto-kursoj**, tri niveloj, Helsingborg (Ann-Christine Kron Dahl, 044/32 51 64)

JUNIO

14–16 **Norvega Esperanto-Kongreso**, Trondheim, Norvegio

Ĉ. 10–14 **Somera kurso**, Karlskoga popolaltlernejo

JULIO

5–11 **Somera Esperanto-Renkontiĝo**, Metsäkartano, Rautavaara, Finnlando (Esperanto-klubo de Helsinki, Pengerkatu 18 A 86, SF-00500 Helsingfors, Finnlando)

5–14 **3-a Verda Ŝakolimpiko**, Podebrady, Ĉeĥoslovakio (Václav Stepánek, Macurova 16, CS-143 00 Praha, Ĉeĥoslovakio)

6–14 **Renkontiĝo Eŭropo-Azio -91**, Sverdlovsk, Sovet-Unio (SU-620077 Sverdlovsk, 77 ab. ja. 67, Urala esperantista societo, Sovetunio)

8–13 **Someraj kursoj**, Karlskoga popola altlernejo

13–19 **Internacia Esperanto-konferenco**, Proprad, Ĉeĥoslovakio (Eric Laubacher, 53, avenue Henri Barbusse, F-92140 Clamart, Francio)

20–26 **41-a Internacia Kongreso de KELI** (kristana), Jönköping, (Karl Buremo, Vallmostigen 29, 554 56 Jönköping)

20–27 **Internacia Junulara Kongreso**, Karlskoga

27 julio–3 aŭgusto **Universala Kongreso de Esperanto**, Bergen, Norvegio

AŬGUSTO

1–7 **Internacia Junulara Semajno**, Szeged, Hungario (Lingvo-Studio, László Szilvási, pf 87, H-1675 Budapest, Hungario)

3–8 **25a Internacia Konferenco de ILEI**, (instruista) Voss, Norvegio, (Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, 242 94 Hörby)

27 aŭgust –1 septembro **24-a Pupteatra internacia festivalo**, Zagreb, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, P.f. 499, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio)

DECEMBRO

15 **La tago de la libro**

Sten Svenonius
Erikstorpsgratan 26 A
21754 Malmö

Esperantoforbund, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm

Daŭrigo de "Prezidanto"

Ĝuste nun la estraranoj laboregas por kunmeti agadplanon por 1991/92, kun bonega helpo de la partoprenintoj en tiu agadkonferenco. Profito de la konferenco estis ankaŭ la agrabla kunestado kaj la ebleco pli bone konatiĝi unu kun la alia.

Karin Lindquist

Daŭrigo de "Pri Roseanna"

Respondo de la redaktanto de La Espero:


Oni certe povas havi malsamajn opiniojn pri la demando, kiuj esprimoj estas svedismoj, kaj kiuj estas metaforoj (*bild, bildligt uttryck*) uzeblaj en esperanto. (Ne temas pri paraboloj, kiuj estas rakontetoj, uzataj por komuniki religiajn aŭ moralajn veraĵojn [*liknelse*], do tute alia afero.)

La kritikoj de la recenzinto tamen temis ankaŭ pri konsekvencaj misuzoj de pluraj vortoj kaj pri ellaso de sume 40 vortoj. M.M. ne tuŝis tiujn demandojn en sia letero, kaj eble ne havas respondon al tiuj komentoj.

Mia fido al la kapablo de la recenzinto de "Roseanna" restas granda.



FOLIOJ DE MIA MEMORO



Muzika kasedo de Eldona

*kun 19 originalaj kantoj
de Ĵomart Amzejev el Kazakio,
kun akompano de Nataŝa Gerlaĥ
- la muzika sensacio de KEF 3.*

Preskaŭ 45 minutoj da ĝuinda muziko por 86 SEK
(inkluzivas sendkostojn). Mendu ĉe

EsperantoCentro, Brunngatan 21,
111 38 STOCKHOLM, tel. 08 - 11 74 34